**AGADO de AVE kaj de AVEanoj**
AVENO # 38 , jarkolekto 2012

Jen gheneralaj informoj pri AVE kaj aliaj CSO-oj kaj
diversaj peticio-petoj, aliaj trovighas je Ekologio & Homaj Rajtoj

**La kotizo por AVE** estas libervole paginda: A-Landanoj kaj riĉuloj: 5 EUR, aliaj 2 EUR / jare
Paginda al nia UEA-Konto: avex-z
Konto de UEA: IBAN: NL72INGB0000378964, BIC: INGBNL2A
Noto: (de "via nomo" por Kto. avex-z)
Elkoran dankon – Manfred Westermayer, la sekretario.
Adreso: AVE, Kandelstr. 62, 79194 Gundelfingen/Br., Germanio, **Retejo de AVE**: http://www.verduloj.org
Nia malferma diskutejo trovighas je Ipernity, tie serchu la grupon "Verduloj"

**Koncizaj informoj:**

**Datumbazo de Esperanto-parolantaj organizajhoj**: http://per.esocom.de/index.html

**Esperanto Internacia** plenigas truon en la Esperanto-movado.
informoj vi trovos je la adreso donita en http://www.stiftung-mondo.de

**Internaciaj Ago-Tagoj** (nur kelkaj)
02-21 : Internacia Tago de la Patrina Lingvo
03-21 : Tago de la Mondcivitanoj
03-22 : Internacia Tago por la Akvo
04-20 : Tago de la Tero
05-09 : Europa-Tago
05-21 : Internacia Tago por la Kultura Evoluo
06-11 : Internacia Tago de la Lingvoj

**Okazajhoj en 2012 kun AVE-anoj:**

**2012-03-27/29 Dakaro** (Senegalio), **Tutmonda Kongreso de la Verda Junularo**:
www.globalyounggreens.org
AVE partoprenos je la (malgranda) Junula Kongreso kun inform-stando por prezenti la temon lingva justeco pere de Esperanto. Ni dankas anticipe al niaj samideanoj Antoine Gomis, Assane Faye kaj Khady Faye.
AVE-anoj ankau partoprenis (la unuan tagon) je la rekte ligita **Kongreso de la Globalaj Verdaj Partioj 2012-03-29/04-01, Dakaro** (Senegalio), Tutmonda Verda Kongreso. http://www.dakar2012.org
**http://www.globalgreens.org**, Ekologia kaj Demokrata Partio de Senegalio: http://www.fedesecolos.com/
(vidu la raporton sur nia retejo)

**2012-07-28/08-04 Greziljono: Alternativa semajno kun verd-politika seminario de AVE**
La "Alternativa Semajno" celas kunvenigi ĉian alternativon: vegetaranoj kaj
bestoprotektantoj, verda kaj ekologia movado, migrantoj kaj biciklantoj por
aplikado de la eko-turisma; la kampada tereno taugas ankau por naturistoj.
Nia aktiveco: eko-turismo, prelegoj pri ekologiaj temoj, tradukado, diskutoj.
Bonvolu rigardi la programon tie: http://gresillon.org/s2

**Proponita nova retejo de AVE** - dank al Penny Vos – ni pridiskutis ghin en Grezijono:
http://tutmondajverduloj.weebly.com/verda-blogo.html

Ne okazis AVE-kunvenoj en:
2012-07... EEU-Kongreso en Galway
2012-07-28/08-04 Hanojo: UK de UEA eble kun kunsido de AVE - kiu pretas gvidi la kunvenon ?
2012-08-11/18 SAT-Kongreso en Jalta - AVE kunlaboras kadre de la Ekologiista Frakcio de SAT.

AVE-anoj **chu ni vizitu la Verdulojn & Europan Parlamenton en Bruselo ?**
Heide Rühle sendis formularon por partopreni oficialan viziton 2012 & 2013 (la surlokajn kostojn kaj eble vojaghkostojn pagos la EP-sistemo. 2-3 tagoj, ni havos almenau 1 horon kun EU-parlamentan(in)o por diskuti - kaj povus organizi aliajn vizitojn. http://www.heide-ruehle.de/heide/fe/pub/de/dct/875
----

2012-09-20 Demandi MEP-on:
Mi ne scias, chu demandoj en Esperanto estos bonvenaj, sed demandi en via (europa) lingvo certe jes:, ekz-e: Kion opinias membro de la Europa Parlamento pri reala esploro de Esperanto rilate la potencialon uzi ghin por la Europa Parlamento.
Vi povas mencii la programon de Les Verts, de 1999, kiam ili jhus tion skribis en la programon.
Au en Germanio la Europan Programon 2009 de Buendnis 90/ Die Gruenen, kiuj menciis sur p. 135:
" ... sowie Esperanto als internationale Sprache der Voelkerverstaendigung. Mehrsprachigkeit ist stark zu foerdern."
Fakte necesus ligi Esperanton kun la kulturo de dauropoveco, char tio estas la baza temo de la demando-propono. Jen la propono de FYEG (junaj europaj verduloj):
"If you had the chance, which questions would you personally want to ask to a Green/EFA Member of the European Parliament? on his/her own lifestyle? her/ his beliefs? On Climate change? On his/her parliamentary work? On his/her hobbies?
Don't be afraid of being curious and creative! Best wishes, Jakob (FYEG)"
Bonvolu skribi ghis la 16a de Oktobro 2012 al: <Greens.stopclimatechange@europarl.europa.eu>

**Mazingira Salama/Ketare en Tanzanio**
tute pozitva afero: la Esperanto Secondary School, helpe de la projekto Mazingira antau la malfermo. Dank al pluraj kunlaborantoj, ekz-e eksterlandaj kiaj Snorre k.a., multaj donacantaj homoj, firmaoj (kaj la aktiva subteno de Monda Fonduso) kaj la subteno de la tanzania registaro, krome dank al la energia laboro de Mramba Simba kaj liaj kunlaborantoj estighis lernejo-konstruaro, kiu taugas por ch 240 lernantoj de la meza lernejo.
(vidu ankau pri aliaj evoluaj asocioj en Afriko sur nia retejo verduloj.org/afriko.htm )
------

2012-11 Movado Sen Nomo (MsN) estas vigla kaj niatempa movado kiu volas starigi pli bonajn interhomajn kontaktojn. Ĝi pledas en tiu ĉi materiisma mondo por "la kulturo de la koro". Ĝi emfazas la "taskon de la koro" en ĉiuj familiaj kaj sociaj rilatoj, en la nacia kaj en la internacia politiko, por ke ĉiu plibonigo estu "homa" plibonigo.
MsN kunlaboras cele al la (re)konstruo de **silentodomo** Metanoia kiu malfermu siajn pordojn en printempo 2014. Ĝi situos en virga naturo kaj invitos vin al malrapidigo kaj plisilentigo.
http://www.movado-sen-nomo.org/
---

Konferencoj subtitoligitaj en Esperanto (ch. 60 en 2012):
http://www.ted.com/translate/languages/eo?page=1
---

Jarfina FESTEego kun Silvestra-Novjara FESTeno
okazas la 3an fojon en la franca Esperanto-kastelo Gresillon
de la 28-a de decembro 2012 ĝis la 2a de januaro 2013
Detalo: www.gresillon.org/jarfino
---

La informbulteno de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato : MONDA SOLIDARECO n-ro 107 estas nun havebla en pdf-formato en Esperanto
http://www.globidar.org/solidareco/ms107-eo.pdf

Ankaù legebla en html-formato :
http://www.globidar.org/solidareco/monda_solidareco.htm

**Informoj pri peticio-petoj** - la subskriboj plejparte estas finitaj, tamen restas ofte la informo:

2012-05-24 Estraro de Publika Transportado en Varsovio malfermis konkurson por nomo, kiun havos sistemo de **publikaj bicikloj en Varsovio**. Fakte ili elektis la nomon en Esperanto: "**Veturilo**" – Gratulon.
Bonvolu ankau subteni la jenan: **Peticio haltigi la mort-batadon de fokoj en Kanado:**
http://www.care2.com/go/z/e/AGOdL/zm.Y/Bx1er

La **Portalo Kunlaboro** invitas vin koni la MP3 sondosieron de Fabelo de Andersen titolita "Birdo Fenikso" kun la voĉoj de Flávio Fonseca kaj Cristina Pancieri, senpage elshutebla:
http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/fabeloj/birdo-fenikso/

La kampanjo **Date with History** estas organizata de la koalicio de NROj, GCCA (Global Campaign for Climate Change). En tiu koalicio partoprenas Rugha Kruco, Internacia Amnestio, Greenpeace, WWF, Skolta Movado, Survival, YMCA, kaj pluraj aliaj.
La intenco estas doni oportunon al junulo reprezenti la mondon kaj paroli al la partoprenantoj de RIO+20. Ghi volas ripeti la trafan paroladon de Severn Suzuki, la 12 jara knabineto, kies parolado silentigis la mondon dum RIO92.
http://www.youtube.com/watch?v=uZsDliXzyAY
Ekzistas la video en Esperanto de Rafael Zerbetto, kun anglaj subtitoloj. La videoj kun pli da voch-donoj estos jughitaj de komisiono el pluraj gravaj NROj kaj aliaj konataj homoj, inter ili, la aktoro Leonardo DiCapprio, la eksa brazila ministrino pri la medio, Marina Silva, kaj Severn Suzuki, mem (nun 32 jara). Jen la komisiono de jughantoj: http://datewithhistory.com/jury/#!/home
Tiu chi voch-donado estas tre grava por ke ni **montru Esperanto al la aliaj NROj**. (ni preferas: Civil-Socia Organizajho, CSO).
----

2011/ 2012 La fina deklaro de la **Konferenco de Neregistaraj Organizoj, kiun la Departamento pri Publika Informado de UN** okazigis en Septembro 2011 en Bonn, Germanio - kaj tie partoprenis 5 UEA-delegitoj - klare mencias la rilaton inter lingvaj rajtoj kaj dauropoveco, kio estis enmetita en la dokumenton dank' al kunlaboro de kvinopo de UEA, TEJO & AVE:

**"Ni alvokas por respekto al kaj inkludigo de etnaj lingvoj en la eduka sistemo, ĉar tiaj lingvoj entenas la kompleksecon de siaj respektivaj medioj, kaj ankaŭ por konsidero de la potencialo de neŭtrala internacia lingvo kombinanta klarecon kaj facilecon de lernado kun sia neŭtraleco, kaj tiel povanta esti rigardata kiel esence daŭripova."**

La UN-dokumento havas la numeron: "A/66/750" kaj trovighas en la 6 oficialaj UN-lingvoj, jen:
http://www.un.org/wcm/content/site/ngoconference/resources/final
Kaj la tradukon en Esperanton sur la retejo de AVE: http://www.verduloj.org/mondo.htm

La temon "lingvo", kiu antaue tute ne estis en la dokumento, ni amendis kie ni opiniis ghin bezonata: Oni serchu en la dokumento per la vorto 'lingva' kaj/au 'diverseco' en la koncerna lingvo.

Vidu ankau la helpklarigojn de Stefano Keller en sia uea-vikipagho pri eksteraj rilatoj:
http://uea.org/vikio/Eksteraj_Rilatoj_de_UEA

La ĉefa **disvastigado de Esperanto en Rio+20** okazis en la Kupolo de la Popoloj
Ni invitas vin koni la Fotojn de Rio+20. Ĉiuj fotoj havas subtekstojn en portugala lingvo kaj Esperanto.
La retadreso estas: http://www.kunlaboro.pro.br/fotos/
------

2012-04-24 Guillaume Armide estas artisto - Li skribas:
Mi nun profesie prezentas **muzikan spektaklon pri daŭripova evoluigo** (DE).
Mi jam kontaktiĝis kun Ursula kaj Alvaro por proponi prezenti en Rio alian spektaklon kiu rilatas al la kongrueco inter Esperanto kaj DE sed, mi rezignis pri tiu projekto pro manko de tempo kaj mono.
Vi povos legi artikolon far mi en la venonta numero de la revuo Kontatko, kiu entute temos pri Rio+20. Tiu artikolo iom klarigas pri DE kaj pri la rilato inter ĝi kaj Esperanto.

2012-08-01/26 **Ecotopia 2012**, Jänschwalde, inter cottbus kaj Guben (orienta Germanio) situas en la kerna regiono de la Soraboj, slava minoritato. La vilagxo havas muzeon pri soraba kulturo. Gxi ankaw havas propran trajnstacion.
Samloke, de la 12-a gxis 19-a de awgusto okazos **Klimat- kaj Energi- tendaro** (iom pli aktivisma)
http://www.ecotopia2012.org
(dankon al Ronaldo <ro-esp@dds.nl>)

**2012-03-11 Kontrau-Atomenergiaj Manifestacioj en tuta Europo:**
Jen alvoko por kontraui la konstruadon de du novaj reaktoroj en TEMELIN (CZ).
**14:00 en Mitterteich** (Bavario): parolos Martin Bursik, iama medioministro en Chehhio i.a. pri korupto rilate la energiofirmaon CEZ; Dieter Janecek, estro de Verduloj en Bavario, pri la politika situacio, kaj Udo Benker-Wienands pri la uranio-ekspluatado en la Ercmontaro kaj la intertempa stokejo por radioaktiva rubo en Mitterteich. Aparte ili protestas, char la administrejoj malakceptis la auskultadon de eksterlandaj civitanoj okaze de planita konstruado de reaktoroj Temelin 3+4 - kiu eblus lau EU-legharo.
Ili ankau primokas severe, ke la asekura sumo por chehhaj atomcentraloj estas nur 320 miljonoj Euroj - komparenda kun damagho de 44 miljardoj Euroj en Fukushima.
Ili preferas investi en alternativajn energiojn ankau en Chehhio.

**Manifestacioj memore al Fukushima 2011-03-11:**
Tie vi trovos informojn por kelkaj manifestacioj en Germanio kaj Francio rememore al la atom-katastrofo de Fukushima. Jes, la cunamo mortigis multajn pli - sed la atom-risko estas homfarita tutmonda minaco.
Certe ankau en aliaj landoj okazos manifestacioj, serchu mem.
2012-03-11 Homa cheno inter Liono kaj Avignon en la valo de la Rhodano kontrau radioaktiva minaco kaj poluado ! Kaj 2012-03-10 Manifestacioj proksime de Fessenheim !
(fr) http://chainehumaine.org/
(fr) http://www.sortirdunucleaire.org/
(mezurado de radioaktiveco, fr) http://www.criirad.org/
(de) http://anti-atom-demo.de/start/home/
(de) http://www.ausgestrahlt.de/mitmachen/fukushima-jahrestag/demos-am-113.html
(de) http://www.gruene-nrw.de/details/nachricht/gross-demo-zum-fukushima-jahrestag-in-gronau.html
En Gronau trovighas la germana uzino por richigi la radioaktivan uranion...
**Pli da detaloj pri (atom)energio** vi trovos sur nia retejo: http://www.verduloj.org/energio.htm

**AGENDO 21 - EU komisaro pri Naturmedio Janez Potochnik** demandas nin kiel agadi dauropovece:
La Eŭropa Komisiono deziras kontroli kaj rekonsideri sian politikon pri unia konsumado kaj produktado.
En intereso de tio, ĝi iniciatas vastan, publikan konsultiĝon kaj atendas diversajn proponojn pri pli ambicia konsumada kaj produktada politiko, rilate al la estonto.
La interreta konsultiĝo estas parto de tia pli ampleksa ideointerŝanĝo, kies rezultoj enkonstruiĝos en la politikajn iniciatojn, aprobotaj
antaŭ la fino de la jaro. Legu pli en Esperanto en la blogo de Eŭropa Civitano:
http://europacivitano.wordpress.com/

"La duono de la demandoj celas la pli vastan publikon, dum la alia duono celas la pli specialajn grupojn de interesitoj, ekzemple registaroj, industriaj asocioj kaj entreprenoj." Jen la ligilojn al la demandiloj - ili estos aktivaj ghis la 3a de Aprilo 2012: (informilo en chiuj oficialaj EU-lingvoj)
http://europa.eu/rapid/pressReleasesAction.do?reference=IP/12/92&format=HTML&aged=0
demandilo: http://ec.europa.eu/environment/consultations/sustainable.htm
(dankon al europa civitano)